DIT
Discesa Internazionale del Tevere in canoa da Città di Castello a Roma dal 24 aprile al 2 maggio

CODIT - Comitato Organizzatore Discesa Internazionale del Tevere
via Fucino 4b 00199 Roma
www.discesadeltevere.org
scrivi@discesadeltevere.org
fax +39.06.62276751

DIT2009

30-a INTERNACIA RIVERIRADO PER KANUOJ SUR TIBERO DE CITTA' DI CASTELLO ĜIS ROMO
24a de aprilo – 2a de majo 2009

Sep Tagoj Padelante, Potaga Irado 20-30 Km, Malfacilecnivelo WW I-II-III

ENKONDUKO

La Internacia Riverirado per kanuo-kajako sur rivero Tibero (Tevere), konata en Italio kaj eksterlande, altiras ĉiujare plurnacian partoprenantaron, ĉu spertulojn, ĉu komencantojn. Ĝi celas antaŭenpuŝi lokan kulturon, turismon kaj la uzon de naturrespektaj veturiloj, kiel kanuo/kajako, por esplori la pejzaĝon. Nepre ne temas pri konkursado.

La programo fiksas unu-tagajn etapojn kun vespera akcepto kaj tranoktado ofertataj far la riverbordaj komunumoj. Ĉiutage, antaŭ la riverekirado, la kondukistoj antaŭen stiras siajn aŭtomobilojn ĝis la atingenda celo kaj per aranĝita aŭtobuso revenas al la elirloko. Tiumaniere iu kanuisto/kajakisto, eĉ se nur unu, eblas partopreni en la riverirado dum iom da tagoj laŭdezire.

La kutima etoso estas gaja, sed disciplina. Iu ajn estas bonvena, tamen adaptiĝemo, kunsento, sindependo kaj simpatio multe helpas agrabligi la spertojn. Kanuistoj/kajakistoj ĉiam interhelpas, precipe surakve dum la komuna riverirado. Oni veturas en grupoj kun la helpa ĉeesto de lertaj kajakistoj.

La familianoj kaj la geamikoj de la partoprenantoj povas profiti pri la okazo por kune viziti la ĉirkaŭajn pejzaĝojn aŭ malkovri neibarajn lokojn per biciklo. La Tibera valo estas aparte riĉa je famaj urboj vizitindaj kiel Perugia, Assisi, Deruta, Todi, k.t.p.

REGULARO

La Internacia Riverirado sur Tibero per Kanuo de Città di Castello ĝis Romo estas gvidata (sed **ne asistata**!) de spertaj kanuisotj kaj enhavas 7 unu-tagajn etapojn de 20 – 30 km, kies malfacilecnivelo estas 1a, 2a (3a) grada. Ĝi estas malfermita al ĉiu kanuisto, itala kai fremda, kiu kapablas alfronti tiujn malfacilecnivelojn kaj konformiĝas al ĉi tiu regularo. Tamen la totala nombro estas limigita laŭ decido de la organiza komitato.

ALLASATAJ BARKOJ Ĉiaj kanuoj estas allasataj, kiuj taŭgas alfronti maltrankvilajn, ondajn akvojn ĝis la 3a grado, estas nesinkipovaj igitaj kaj ekipitaj per maniloj por ilin transporti kaj rekapti. Ĉiu kanuisto **devige** surmetos kasketon kaj savjakon (minimuma flospuŝo 6 kg, plibone 9), kiuj taŭgas ankaŭ por ŝirmado kontraŭ branĉoj kaj aliaj obstakloj. La ŝprucĉirmilo estas deviga por la kajakoj. **Pri vestado**, oni konsilas uzi akvan kombineon, akvan jakon kaj fortikajn sportajn ŝuojn. Akvimuna sako, kiun oni povas enmeti en kanuon, ebligos utile kunporti personajn aĵojn, manĝaĵojn, kromvestojn pro ŝanĝo, ktp. Memoru ke dum korpa aktivado oni bezonas trinki, bonvolu kunporti iom da trinkakvo!

La Riverirado okazas **en grupoj,** dum spertaj kajakistoj kontrolas kaj helpas; oni ne rajtas preterpasi la kajakistojn, kiujn la organizantoj nomumis **kapon**, nek postsekvi la **voston**. Ĉiuj partoprenantoj devas sekvi la indikojn kaj horarojn donitajn far la organizantoj kaj la gvidantoj dum la matena aŭ vespera kunveno, sammaniere dum la riverirado.

ATENTU: la riverirado nepre okazas sub sia propra respondeco; la organizaĵo ne provizas servon de asisto kaj sekureco dum la riverirado, pro neebleco de kontroli grandan nombron de partoprenantoj laŭ tiom longa vojo; la partoprenanto nepre kaj diligente sekvu la indikojn donitajn de ĉi tiu regularo kaj dum la riverirado.

PRI LA LOĜISTIKO

La tranoktado okazas en gimnastikejoj aŭ similaj lokoj, kaj ĉiuj devas sin provizi de necesaĵoj por tranokti. Necesejoj kaj duŝejoj estas je dispono. Kiu preferas povos tranokti en sia tendo aŭ loĝveturilo.

Ĉiu matene estas organizata la servo por reen porti la veturilgvidantoj kiuj, potage, antaŭenportas sian veturilon ĝis la alvenloko. Nur por la stirintoj!

Ĉiuvespere oni organizas ankaŭ kunan, abundan vespermanĝon ĉe loka gastiganta organizo, ĝi devas esti mendata dum la matenmanĝo. La organiza komitato nek aĉetas nek kuraĝigas la uzon de nur-unu-uza teleraro: tial oni devas kunporti propran glason, teleron kaj manĝilojn.

ALIĜO

Mi deklaras ke mi legis kaj tute akceptas la supran regularon por la partopreno en la Riverirado.

Mi deklaras ke mi estas fizike taŭga kaj posedas la kapablojn kaj la ekipaĵon, kiuj necesas por partopreni la programon.

Mi deklaras ke estas nenio malhelpo malebliganta al mi la sporton de kajako en moviĝanta akvo.

Mi rajtigas la organizon de la surtibera Riverirado uzi miajn personajn datumojn nur por la aliĝnecesaĝoj.

Nomo, Familionomo :	**Urbo, Lando :**
Retadreso :	**Subskribo :**

Se vi deziras pluajn informojn esperantlingvajn, bonvolu demandi al la retadreso sandro(heliko)kri.it

aŭ per skajpo al *kalanag291151*

Krome, ĉiuj samideanoj kiuj ŝatus partopreni bonvolu sciigi al sama retadreso kaj samtempe al oficiala retadreso scrivi(heliko)discesadeltevere.org . Nepre esperantlingve!